Sendependa bitrevuo

# Afrika Esperantisto

Loka agado por tutmonda afero

1-a jaro. n-ro 01(7)| julio 2024

*Karaj legantoj,*

*Jen la unua numero de ''Afrika Esperantisto'' per kiu mi arogas al mi alporti novaĵojn pri la movado en Afriko al vi ĉiuj, precipe al vi, kiuj ne membras en la afrikaj ret-listoj por esti informitaj pri tio, kio okazas en la kontinento.*

*Post la sukceso de la provnumero, mi elkore kaj pasie pretigis ĉi tiun novan numeron, kiun, mi esperas, vi ŝatos same kiel la antaŭan.*

*Vi trovos en ĉi tiu numero plurajn artikolojn pri diversaj kaj fascinaj temoj: vortoj de la legantoj, intervjuo kun la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato de la ĉi-jara UK en Aruŝo, raportoj pri aktualaj agadoj kaj projektoj de afrikanoj, sed ankaŭ priinstrua kroniko kaj praktikaj konsiloj.*

*La aperigo de la nuna numero montras miajn engaĝiĝon kaj entuziasmon unue satigi vin per informoj. Bonvolu trarigardi la sekvajn paĝojn de la revuo por pli bone enprofundiĝi en la unuopaj alcelaj agadoj en la kontinento.*

*Kion vi trovos pliboniginda kaj eĉ pliboniginda, tion vi bv. tuj diri al la redakcio. Raportu al la aliaj ĉion bonan, kion vi legas tie ĉi, kaj invitu ĉiujn legi la revuon.*

*Al mi restas la espero, ke esperantistoj en la landoj kie ne glate funkcias la movado, imitos la aktivulojn pri kiuj raportas tiu ĉi numero.*

*Bonan legadon!*

**Adjévi Adjé**

## La 2-a Afrika Kongreso de Virinoj okazos en Aruŝo



La Esperantista Virina Asocio en Afriko (EVAA) organizas la 2-an Afrikan Kongreson de Virinoj (AKVo), kiu okazos de la 30-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2024 en Aruŝo, Tanzanio, tuj antaŭ la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK). La 2-a AKVo okazos danke al subteno de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj *Esperantic Studies Foundation* (ESF).

La kongresa temo estas *Virinoj: leviloj de daŭrigebla disvolviĝado*. Tiu ĉi temo fokusiĝos al la potencigo de virinoj. Ĝi emfazas la fakton, ke investado en la subteno kaj trejnado de virinoj estas disvolviĝa levilo por landoj kaj kontinentoj. Estas planataj multaj aktivaĵoj, inter ili prelegoj, kundivido de spertoj, artaj atelieroj, instruado de Esperanto kaj komunaj vizitoj.

La 2-a AKVo okazos en la katolika loĝejo *Catholic Archidiocese of Arusha Center House, Kanisa Road 9*, Aruŝo, Tanzanio. La kongresejo havas belan ĝardenon, programsalon, kuirejon kaj komfortajn dormoĉambrojn. La kongresejo estos poste uzata de la Internacia Infan-Adoleskanta Kongreseto (IIK).

EVAA kaj UEA ĝoje invitas vin veni kaj partopreni. Jam 50 e-istinoj de diversaj aĝogrupoj aliĝis el pluraj landoj. La organizantoj nun aparte bonvenigas virinojn ekster Afriko. Konsideru partopreni! Por aliĝi bv. skribi al *le.myrhe@gmail.com* kaj *alexandrine.omba7@gmail.com*. Pli da informoj ĉe Eventa Servo: *https://eventaservo.org/e/VirinaKongreso*.

Oni bonvenas ankaŭ partopreni en la 109-a UK kaj en la 52-a IIK.

**Gazetara Komuniko de UEA, 2024, №1173**

# Lomeo refoje kunvenis



13 membroj kaj amikoj de la Esperanto-grupo de Lomeo, konata ankaŭ sub la nomo TogoPlus aŭ APETO, kunvenis en la kutima universitata centro St Jean de Lomeo sabate la 29-an de junio 2024. La kunveno komenciĝis je la 15-a horo per sinprezento de ĉiuj partoprenantoj kaj trakto de la temoj en la tagordo.

Unue, kopioj de la lernolibro Metodo 11 estis distribuataj al ĉiuj. Sekvis 5-minuta silenta observado de la apuda bildo ilustranta la tagan lecionon kaj poste volonta interpreto de la koncerna bildo fare de la kursanoj laŭ ties kompreno en la franca, evea aŭ Esperanto. Poste, kiel la kursogvidanto, mi voĉlegis laŭte la lecionon kaj ĉiuj kursanoj laŭvice faris la samon. Klarigoj de entekstaj «malfacilaj» vortoj, uzekzemploj pri *Kiu*, *Kio* ktp kaj helpaj konsiletoj kaj rimedoj por plibonigi sian prononcadon kaj lingvajn kapablojn konsistigis la postan unuhoran kurson, resume.

Diskutiĝis pluraj aliaj temoj rilataj al la lernado de Esperanto, venontaj agadoj kaj aktivaĵoj de TogoPlus. La membroj havis la ŝancon fari rekomendojn, doni siajn opiniojn kaj levi demandojn pri ĉiuj diskutataj punktoj, i.a. partopren(ig)o de togolandanoj en la 109-a UK en Aruŝo, plano por la aranĝo de la 9-a Afrika Kongreso de Esperanto, venonta grupa studvojaĝo enlande…

Notindas, ke dum la renkonto okazis ankaŭ kelkminuta videobabilado kun la esperantistino Norine Schanti de Aŭstrio kun ĉiuj. Plie, Koffitché raportis pri la afrika retradio sub sia kunordigo kunlabore inter la Afrika Komisiono, kunhavigis ligilon al la radiaj elsendprogramoj kun invito sekvi la programojn. Siaflanke, Kossivi Massan prezentis pri la genetika malsano hemoglobino S, franclingve *drépanocytose*. Ŝi parolis pri kiel tio disvolviĝas, konsilis pri kiel precipe evitigi tion al oniaj idoj kaj pri la klopodoj de la registaro malpliigi tiun malsanon en Togolando.

Fine de la kunveno estis resumitaj la ĉefaj punktoj diskutitaj kaj anoncita la dato de la sekva kunveno. La kunvenintoj esprimis sian kontenton pri la aranĝo kaj ankaŭ sian entuziasmon pri la venontaj aktivaĵoj. Ne mankis kunmanĝeto, momento de privataj interbabiladoj, sociaj interagoj, kiuj permesis al ĉiuj kunvenintoj pli bone koni unu la alian kaj plifortigi la ligojn ene de la grupo. Ni ĉiuj disiĝis motivitaj kaj entuziasmaj por plulerni kaj praktiki Esperanton.

**Adjévi Adjé**

# *Zagreba Metodo* en la svahila

Kroata E-Ligo publikigis en Tanzanio novan lernolibron de Esperanto laŭ la *Zagreba Metodo* en la svahila lingvo. La lernilon adaptis al la svahila burundano Eric Nsabiyumva. La svahila estas parolata de ĉ. 100 milionoj da homoj en orienta Afriko en 12 landoj. La libro estis presita en Aruŝo, la kongresurbo de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu la unuan fojon okazas en Afriko.

Tridek unuaj ekzempleroj estos senpage distribuataj dum la Movada Foiro en Aruŝo. Postkongrese la lernolibro estos havebla ĉe Kroata Esperanto-Ligo kontraŭ 10 eŭroj, plus sendokostoj.

Tio estas la 22-a lingva presita lernilo lanĉita de Zlatko Tišljar kaj liaj kunlaborantoj en 1978. En multaj pliaj lingvoj ĝi estas konsultebla ĉe *https://esperanto12.net*

**Spomenka Štimec**

# Julio 2023 — julio 2024: Afrika Retradio 1-jariĝas!




Antaŭ jaro, la 22-an de julio 2023, sub la prizorgado de Koufionou Koffitché kunlabore inter la Afrika Komisiono de UEA, komencis funkcii la Afrika Retradio, kies sidejo estas en Lomeo, Togolando.

La radio estas unu el la atingoj de la lasta tutkontinenta kongreso de Esperanto. *Ni estis du estraranoj de UEA - Jérémie Sabiyumva, el Burundo, kaj mi mem, François Lo Jacomo, el Francio - en la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto, en Tieso (Senegalo), inter la 26-a kaj la 30 -a de decembro 2022, kaj projekto speciale allogis mian atenton: tiu de Koffitche Koufionou pri retradio*, klarigas François Lo Jacomo, kiu nome de UEA organizis kampanjon pri amasfinancado por financi la projekton.

Tiu ĉi radio elsendas regule en Esperanto pri la ĉiutaga E-vivo, nome Esperanto-historio, planoj, atingoj, agadoj en Afriko kaj ĝenerale en la mondo. Ĝi prezentas en siaj programoj ankaŭ muzikon en Esperanto kaj havas, laŭ François, irleteron: *Elsendi Esperanto-kursojn, vigligi la Esperanto-povadon en Afriko kaj informi interalie pri la ebloj partopreni en la Tanzania UK.* Eblas sekvi la elsendprogramojn de la radio ĉe *https://www.facebook.com/profile.php?id=61551737070537.* Tie ĉiuj esperantistoj povas skribi kuraĝigan mesaĝon, levi demandon aŭ komenti elsendon.

Afrika Retradio estas la dua funkcianta retradio en la afrika Esperanto-medio. La unua, Aminda Retradio Esperanto, naskiĝis en la 2014-a jaro kaj elsendas de Madagaskaro sub la prizorgo de Fidilalao Henriél Firaisana. Ambaŭ radioj estas simplaj podkastaj sonregistraĵoj, kiuj reaŭskulteblas en ajna momento. Oni povas aŭskulti la elsendon per simpla muzikaŭskultilo. Ĉiuj, kiuj havas bonan retaliron povas rekte aŭskulti la sonmaterialojn en bona kvalito.




Kiu ekŝatas muzikon ĵus prezentitan en elsendo de ambaŭ radioj, tiu povas retskribi al la prizorgantoj por ricevi informon pri la nomo de la artisto aŭ grupo kaj eventuale indikojn pri la albumo. Sed se oni jam konas la informojn pri la artisto aŭ grupo, eblas mem esplori pri tio en la reto kaj havigi al si post monpago la diskon de la ŝatata muziko rekte de la muzikvendisto aŭ eldonejo.

**www.esperanto-afriko.org**

# Esperantujo ĉefurbos en Aruŝo por la 109-a UK!

**En la 1989-a kaj iom poste en la 1998-a jaro montriĝis vera deziro pri UK en Afriko. En 2016, dum la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE), eknaskiĝis klara plano por inviti kaj organizi UK en la kontinento. Longan tempon afrikanoj sopiris pri tiu ĉi renkontiĝo en la kontinento, UK! Finfine ĉi-jare la ĉefurbo de Esperantujo moviĝos al Aruŝo, Tanzanio, kien ĉiuj baldaŭ alvojaĝos por partopreni en la plej prestiĝa Esperanto-simfonio: la 109-a Universala Kongreso. En intervjuo de *Afrika Esperantisto* la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato (LKK) rakontas pri la pretiglaboroj. Bonvolu sekvi la diskutojn!**



***Saluton, Costantine Mashauri! Ĉu vi, kiel la prezidanto de la LKK (Loka Kongresa Komitato, povas iom rakonti pri la pretiglaboroj de la 109-a UK?***

Saluton Adjévi! La pretiglaboroj progresas laŭplane – eĉ se ni devas uzi proprajn rimedojn. La LKK laboras senĉese kaj senlace en interkonsiliĝo kun la Kongresa Fako kaj la estraro de UEA por elbaki memorindan kongreson. Surloke ni kunlaboras kun la enlandaj aŭtoritatuloj de diversaj publikaj instancoj. Certe la ĉi-jara UK estos vera novaĵo pro okazigo de renovigitaj programeroj. La nacia vespero estos senprecedenta en aparta etoso kun partopreno de tanzaniaj oficialuloj, ekzemple. Plie, ni laboras por havi niajn homojn ĉe la flughavenoj por akcepti la alvenintojn kaj laŭeble ankaŭ helpi al ili plenigi formularojn ktp. Laboro estas same farita por faciligi la enloĝigon sen kroma monpago al homoj, kiuj lastmomente vojaĝos al Aruŝo senantaŭmendo de hotelo.

***Kio instigis vian landon inviti la organizon de la 109-a UK en Aruŝo?***

Esperanto-Asocio de Tanzanio (EATA) estas aliĝinta landa asocio de UEA. Esperanto estas nia laborlingvo; sekve ni laboras por ĝia diskonigo. Plie, ni celis respondi al la demando pri la neniama okazigo de UK en Afriko, sciante ke la IJK kaj ILEI-kongreso jam okazis en la kontinento.

***Oni aŭdis rimarkojn de iuj, ke UK estas ĉiam la sama, ke sufiĉas partopreni unu kaj poste jam estas nenio nova. Kial homoj devus vojaĝi al la UK en Aruŝo?***

La ĉi-jara kongreso estas historia, ĉar unuafoje la UK okazas en Afriko. Ĉi tio donas al la partoprenantoj la okazon ĉeeste lerni pri afrika kulturo, viziti lokajn vidindaĵojn kaj havi persone kaj kulture riĉigan sperton. La 109-a UK estas unika oportuno por veni renkonti esperantistojn el diversaj landoj kaj kontinentoj, interŝanĝi ideojn, revidi malnovajn amikojn kaj ekhavi novajn. Plie, vojaĝi al la kongreso en Aruŝo estas maniero montri sian subtenon al la tutmonda esperantistaro kaj kontribui al ĝia kresko kaj daŭripovo. Estas ankaŭ okazo por partopreni en la diskonigo de Esperanto kiel internacia lingvo kaj ilo por justa komunikado en Tanzanio.

***Estas komuna arangô al la pinto de Kilimanĝaro. Ĉu vi povas diri iom pri tiu programo?***

Jes, okazos antaŭkongresaj ekskursoj. Unu el tiuj estas komuna grimpado al la pinto de la plej alta monto de Afriko, Kilimanĝaro. La programo disvolviĝos inter la 22-a kaj la 28-a de julio 2024. Jam aliĝis esperantistoj, sed ankoraŭ eblas anonci sin por partopreni la arangôn. Eblas spekti en la reto filmeton de la jam farita grimpado kun la Esperanta flago ĝis la pinto.

***Ĉu estas pli da aferoj, kiujn indos veni sperti en Aruŝo?***

Certe jes! Krom la diversa kongresa programo, kiu inkluzivas edukajn sesiojn, konferencojn, prelegojn, laborgrupojn, kulturajn agadojn, literaturajn prezentadojn, koncertojn ktp – kio permesas al partoprenantoj profundigi sian scion pri Esperanto kaj esplori novajn temojn – la UK-anoj havos la ŝancon malkovri Tanzanion, ĝian historion, ĝian kulturon kaj ĝian naturan belecon. Tio povas riĉigi ilian personan kaj turisman sperton. Ĉu vi



estas sperta esperantisto, komencanto aŭ simpla turisto… ĉiu trovos ion laŭ sia gusto. Venu, ni strebas por kontentigi ĉiujn!

***Ni alvenis al la fino de tiu ĉi interparolo. Ĉu vi havas apartan parolon?***

Jes, tio koncernas la ofertojn, pri kiuj mi volas refoje atentigi, nome a) LKK proponas senpagan veturigon de la flughavenoj Kilimanĝaro kaj Aruŝo al la kongresurbo al ĉiuj kiuj aliĝos al la 109-a UK, partopreninte la 57-an ILEI-kongreson en Brazilo; b) ni bonvenigas invest- kaj komerc-proponojn en Tanzanio kun la beno de la registaro; c) kaj ne timu tiuj, kiuj estas interesitaj sed ankoraŭ ne faris mendojn pri antaŭkongresoj. Ankoraŭ eblas enskribiĝi. Aruŝo antaŭĝojas bonvenigi ĉiujn al la 109-a UK!

**A. Adjévi**

# Kie okazos la 9-a Afrika Kongreso?



Antaŭ monatoj estis informoj, ke la Afrika Komisiono de UEA decidis alvoki publike pri la organizado de la 9-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE). Fine tiu ĉi alvoko estis oficiale farita en la kontinenta komunik-listo, kelktage post simila komuniko de la Afrika Retradio la 22-an de junio 2024.

Siaflanke, dum ĵus pasinta kunveno, Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando (APETO) ankaŭ konata kiel TogoPus ne nur montris intereson, sed formale pretas inviti la 9-an AKE en Togolando. Krom la togolanda grupo, Kenjo estas ĝis nun la alia lando, kiu publike anoncis deziron pri la aranĝo de la venonta Afrika Kongreso.

Dum la UK en Aruŝo oni aŭdos pri la afrikaj perspektivoj, kvankam ĝuste estas konate, ke la tutkontinenta kongreso okazas ĉiun trian jaron. Ĉiuokaze, la estrarano de UEA pri Afriko Jérémie Sabiyumva kaj kelkaj membroj de la Afrika Komisiono portas subtenon al la kandidatiĝo de Togolando.

Intertempe UEA dediĉas sian atenton al Afriko, ĉu per la partoprenigo de afrikanoj en la 109-a UK, ĉu per subteno de projektoj de la Afrika Komisiono per la programo *Ni Semas*. La afrika movado certagrade viglas.

Entute jam okazis ok (8) Afrikaj Konresoj de Esperanto: Benino (2), Tanzanio (2), Ganao (1) Senegalo (1), Burundo (1) kaj Togolando (1). La venonta kongreso estos la 2-a en Togolando se la lando estos elektita por ĝin gastigi aŭ la 1-a en Kenjo.

# Ili gratulis…

*Gratulojn al Aĝevi pro la revuo kaj al Apelete Agbolo pro la nomumo kiel membro de la Evea Akademio. Se li finverkos la vortaron Evean-Esperantan, mi promesas trovi la manieron eldoni ĝin. Eble ni devas trovi manieron por ke li kunlaboru kun la Akademio de Esperanto. Amike*

***Renato***

*Mi elŝutis kaj forte ĝojas pro la entuziasmo kiu elradias el tiu ĉi nova revuo. Korajn gratulojn kaj prosperon en via laboro.*

***Carlo Minnaja***

*Saluton! Gratulojn pro tiu nova paŝo. Kiam Apelete Agbolo prelegis en Svislando, venis la ideo, ke li povus subteni la kreadon de akademio por la arpitana lingvo, kiu ankoraŭ ne havas tian strukturon. Elkore.*

***Mireille Grosjean***

*Dankon. Mi savis ĝin por aperigo komencloke en EKO 25. Numero 24 bedaŭrinde estas jam ege pli ol plena!*

***Stefan MacGill***

*Gratulon Adjévi! Mi tre fieras pro tio ĉi! Amike.* ***Richard de Burundo***


*Gratulon al Adjévi kaj plian sukceson.*

***Kokou Sagbadjélou***

*Brave! Koran dankon, Adjévi, pro ''Afrika Esperantisto''. Mi estas leganto de ĝi. Kun koraj salutoj*

***Mulele Mbassa Makaranga***

# Esperanto en la lernejo en Tanzanio



JAMHURI YA MUUNGANO WA TANZANIA

OFISI YA RAIS
TAWALA ZA MIKOA NA SERIKALI ZA MITAA

HALMASHAURI YA JIJI LA ARUSHA

*Unapojibu tafadhali taja:*
Kumb. NA. ED.404/296/01/65

**Tarehe: 10, Juni , 2024**

Wakuu wa Shule
Shule za Sekondari
**Arusha**

**Yah: KIBALI CHA KUFUNDISHA LUGHA YA KIESPERANTO KATIKA SHULE ZA ARUSHA JIJI**

Husika mada tajwa hapo juu.

2. Rejea barua yako isiyo na Kumbukumbu Na. ya tarehe 24.04.2024 inayohusu mada tajwa hapo juu.

3. Kwa barua hii napenda kukutaarifu kuwa kibali kimetolewa kwako kwa shule za Sekondari zote kama ulivyoomba. Aidha sheria na taratibu zifuatwe bila kuharibu ratiba za masomo kwa kuwa kujifunza lugha hii ni hiari ,pia hakuna gharama zozote zitakazo tajwa kwa Wanafunzi au Walimu.

4. Nawatakia utekelezaji mwema.

Joshua I. Mange
**Kny: MKURUGENZI WA JIJI**
**ARUSHA**

**Nakala:** Mkurugenzi wa Jiji
**ARUSHA** - Aione kwenye jalada

Ofisi Kuu ya Halmashauri ya Jiji la Arusha, 20 Barabara ya Boma, S.L.P 3013, 23101 ARUSHA.
Simu: +255 27 25448073, Nukushi: +255 27 2545768. Baruapepe: cd@arushacc.go.tz, Tovuti: www.arushacc.go.tz

*Mi tre feliĉas, ĉar post iom longa diskuto kun la Direktoro pri la edukado en Aruŝo, mi fine ricevis permesilon por instrui Esperanton en ĉiuj ŝtataj mezlernejoj de la urbo. Mi kredas, ke ni iam ankaŭ ricevos permeson por instrui Esperanton tra la tuta nacia teritorio de Tanzanio*, anoncis entuziasme John Magessa, unu el la aktivaj fortoj de la Loka Kongresa Komitato de la 109-a UK, ricevinto de la koncerna oficiala atestilo la 10-an de junio 2024.

Ekde kiam la estraro de UEA unuanime aprobis la kandidatiĝon de Tanzanio kiel la gastiganta lando de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto, E-Asocio de Tanzanio (EATA) kaj ĝiaj membroj ne ĉesis elpaŝi publike favore al la disvastigo de la internacia lingvo en Tanzanio. Ili ne nur konigas la uzadon de Esperanto al deciduloj de la publikaj enlandaj instancoj, sed ankaŭ provas konvinki tiujn ĉi pri la idealoj de la lingvo kaj la neceso enkonduki ĝin en la lernejan lernoprogramon.

Plia flanka atingo estas, ke la instruado de Esperanto en la ŝtataj lernejoj en Tanzanio ankaŭ antaŭenigos la interkulturan konscion. Lernante Esperanton kaj mergante sin en la movadon, nome partoprenante en la kongreso, la gelernantoj disvolvos pli profundan pritakson pri la diverseco de la mondo. Tio instigos ilin al respekto, toleremo kaj reciproka kompreno, esencaj valoroj en nia tutmondiĝinta socio.

Indas ankaŭ mencii pri tio, ke krom lia ĝisosta esperantisteco - diplomito de UEA pri Elstara Esperanto-Agado en la jaro 2020, John Magessa laŭprofesie estas ŝtata instruisto jam de pluraj jaroj.

***Elsvahiligo de la esenco de la teksto sur la apuda atestilo:**

*PERMESO POR INSTRUI ESPERANTON EN LERNEJO [PUBLIKA] DE ARUŜO*

*Per tiu ĉi permesilo, mi plezure informas vin, ke ni rajtigas al vi aliri [publikajn] mezlernejojn kiel vi tion petis. Tamen, vi devas respekti ĉiujn lernejajn regularojn enlandajn sen agi kontraŭ ili. La [Esperanta] lern(ig)o ne estos deviga. Atentu, ke neniu monpago estu postulata, nek de la gelernantoj, nek de la geinstruistoj.*

# Esperanto-kurso kaj ekzameno en Benino

En la ĵus pasinta majo okazis kvar kurssesioj, en kiuj la ĉeestantinoj lernis pri imperativo, sufikso *in*, la tagoj de la monatoj kaj la monatoj de la jaro, nomo de nombroj, ordaj nombroj kaj koloroj. Ne mankis kalkulado, kiu ebligis la kursaninojn lerni parkere kalkuli laŭ unuo de 1 ĝis 30 kaj per deko de 10 ĝis 100. De tempo al tempo estis ankaŭ diktaĵoj, prepare al la antaŭvidita ekzameno.



Vendredon, la 7-an de junio 2024, okazis E-ekzameno kun 15 partoprenantinoj. La ekzamena demandaro konsistas el kvin taskoj, kvar el kiuj rilatas al bazaj gramatikaĵoj. Temas pri finaĵoj (*i, as, is, os, u, a, o, j*), pronomoj, nomo de nombroj kaj vort/fraztraduko. La kvina tasko fokusiĝis pri diktaĵo, kio tuŝas fonetikon. Multaj junulinoj maltrafis ĝin pro tio, ke ili tiam devis sin

prepari por la lernojarfinaj oficialaj ekzamenoj. El la 15 ekzamenitoj, 13 atingis la sukceslimon.

La tri plej bonaj sukcesintoj ricevos premiojn kaj la kvar sekvantaj sukcesintoj, konsol-lotojn. Donacoj ĉiuspecaj, kaj por helpi premii kaj por subteni la projekton, bonvenas. La premio-disdono okazos venontan lernjaron en kiu la agado pluokazos. La 28-an de junio ni oficiale ekferiis kaj ekos la venonta lerno-jaro la 16-an de septembro 2024.

La nomoj de la unuaj sep sukcesintoj estas:

| N | Nomo kaj Antaŭnomo(j) | Poentoj |
|---|---|---|
| 1 | Houngbedji Gloria | 19/20 |
| 2 | Houngue M. Eléonore | 18,50/20 |
| 3 | Dahoue L. J. Floriane | 17,75/20 |
| 4 | Godjo Aloue B. Miracle | 17,25/20 |
| 5 | Gbedahin Fifamé Alice | 17/20 |
| 6 | Gansou Justine | 16,50/20 |
| 7 | Noumonvi O. Kafoui | 16,50/20 |

En Benino, la lerno-jaro komenciĝas septembre kaj finiĝas junie. La junia monato estas kutime por la okazigo de diversgradaj ŝtataj ekzamenoj. Esperanto-agado en la finiĝinta lerno-jaro ekis malfrue kaj precize en marto pro multaj praktikaj kaŭzoj. La kursaninoj entute do lernis dum tri plenaj monatoj antaŭ la ekzameno. Tio meritas apartan atenton.

**Latifou Gbadamassi**

# Necesaj kapabloj de lingvo-instruisto

Se temas pri instruisto pri lingvo, la kapabloj pri tiu lingvo devas esti altnivelaj. Ni reliefigu 3 ecojn, 3 aspektojn:

*1-* bona instruisto devas havi **sciojn**. Kompreneble oni povas trovi sciojn en libroj kaj en la reto, sed pli bone havi iom da stoko en la memoro; 2- bona instruisto estu **inteligenta**. Kapablo analizi, sintezi, dedukti, kompari, resumi. Kapablo senti la homojn, la etoson, la instruisto ankaŭ havu sociajn kapablojn; 3- bona instruisto devas esti bona **pedagogo**. Kapablo percepti la lernsituacion, konsideri ĝin, adaptiĝi al ĝi. Kapablo prepari kaj prezenti salteblajn paŝojn por ĉiuj lernantoj. Kapablo konstrui varian kurson kun legado, skribado, aŭskuldato, parolado, ekzercado, kantado, teatrado, ludoj, en bona ekvilibro. Kapablo paki la lernendajn paŝojn en amuzaj kaj maltedaj kursoj. Memfido, kiel roko meze de rivero. Doni plenan atenton al la grupo. Oni koncentriĝu pri *Ĉi tie kaj nun*. Kapablo respondi al diversaj demanoj tamen gvidi kiel kapitano, mastrumi la tempon kaj la temon. Kapablo respekti la lernantojn. Fini la programon (en kazo de deviga lernado), alveni akurate, aspekti dece... Kapablo klare kaj pozitive komuniki. Havi entuziasmon kaj karismon por tiri la lernantojn al sukceso (lernado, kresko de motivigo).

La tasko de la instruisto ne estas plaĉi al la lernantoj. Ĉiam kelkaj lernantoj ne ŝatas la personecon de la instruisto. Nun imagu senscian homon pedagogie tre dotitan... ... inteligentan homon sen pedagogiaj kapabloj.... ...inteligentan homon sen scioj... Tia homo ekzistas! Bona instruisto devas esti mezbona, bona aŭ tre bona en la 3 kampoj. Ne povas esti truo. Temas pri giganta defio! Instruado rilatas al loka kulturo. Ne eblas kopii elstaran instruiston. Ĉiu devas trovi sian stilon. Kiel ganto. Tamen sperto-interŝanĝoj tre valoras. Por tio ni havas antaŭ ni iom da tempo... La ĉefa rolo de instruisto estas nutri la motivadon de la gelernantoj. La motivado estas motoro, kiu bezonas benzinon.

Por reveni al nia temo: ni ĉiuj estas lernantoj, ni daŭre estas en lernado. Vidu Grundtvig! Li estis dano kaj insistis pri *Lernado dum la tuta vivo*. Pri lingvoj oni neniam povas ĉion scii. Majstri lingvon ne eblas. Mi plurfoje monate lernas novajn vortojn en la franca, kiu estas mia denaska lingvo. Same pri instruado: neniam iu povas diri: nun mi instruas perfekte. Majstri instruadon ne eblas.

El *Faktoj kaj Fantazioj* (laŭ -memore): lerni kun instruisto, kiu asertas, ke li/ŝi majstras ĉion, similas al trinkado de malpura akvo de verdeca lageto; lerni kun instruisto, kiu daŭre esploras kaj provas progresi, similas al trinkado el pura rivereto.

**Mireille Grosjean**

Universala Esperanto-Asocio
uea
Esperantoŋkeke
Siamlɔm 26lia ƒè 2024lia

# Ĝenerala jarkunveno de Esperanto-Plus

Esperanto-Plus okazigis sian ĝeneralan kunvenon en Arrout, Francio, dimanĉe la 09-an de junio 2024. Ĉeestis 11 membroj kaj 19 aliaj sendis rajtigilon. Post komuna kunmanĝo, la kunvenantoj kun plezuro babilis pri la asocio, kiu tiel karas al ili.

Sub la prezido de la eliranta prezidanto, Jean-Pierre Marcq, la kunveno konatiĝis tralege, kiel kutime, kun la raportoj de la subtenataj grupoj. Tio ĉefe koncernis ilian agadon en la dua semestro de la jaro 2023. Temas pri resumaj raportoj de Adjévi, Koffitché kaj Judith (Togolando), Henriel (Madagaskaro), Mulele, Paul kaj Dismas (Tanzanio), kaj Honoré (Nordkivuo).

Notindas, ke la jaro 2023 por ĉiuj afrikaj esperantistoj kroniĝis per la impeto pro la perspektivo de la unua Universala Kongreso (UK) en Afriko, nome en Aruŝo en Tanzanio, ĉe la piedo de Kilimanĝaro, en la sekva aŭgusto.

La kunveno aprobis la financan raporton, prezentita en tabelo tiel, ke klaras la financa stato de la asocio. La kunveno kuraĝigas rektajn monpagojn al la Esperanto-Plusa bankkonto, kies konto-informoj estas publike alireblaj por ĉiuj personoj ĉe *https://esperantoplus.jimdofree.com* kaj proponas por la jaro 2025 pliigon de la sendokostoj, ĉar kurzoj pli kaj pli altiĝas.

Renoviĝis unuanime la estraro de Esperanto-Plus. En ĝi membras kiel la prezidanto Jean-Pierre Marcq, sekretario Nicolas Gaufillet, vicsekretario Frédéric Dovin kaj kasisto Évelyne Rotellini.

La kunveno ankaŭ diskutis pri perspektivoj kaj proponis produkti diversajn ilojn por plidiskonigi Esperanto-Plus kaj per tio varbi eblajn kotizantojn. Unu el la rimedoj estas la filmeto *https://www.youtube.com/watch?v=4NePL34Qu0g* kiu daŭre aktualas.

Rimarkindas, ke pli ol unu subtenato de Esperanto-Plus aliĝis kaj ĉeestos la kongreson en Aruŝo. Aparte necesas emfazi la laboron de la togolanda grupo, al kiu ni konfidis parton de la funkciado de la asocio. Nepre bezonatas tempo kaj rimedoj, kio ne ĉiam facile efektivigeblas en afrikaj landoj, sed la entuziasmo plu estas tie. Pruvo de tio estas apero de la unua revuo «Afrika Esperantisto» en Togolando por la atento de ĉiuj afrikaj esperantistoj. La asocio kun granda plezuro atingos ĉiujn per ĉi tiu kanalo.

For de tiu mizera bildo pri Afriko prezentita en la amaskomunikiloj, Esperanto-Plus deziras koncentriĝi pri la akcelo de la dinamismo de ties amikoj afrikaj, kies kapabloj tro ofte estas subtaksitaj. Kaj tiel invitas legi la revuon, *Loka agado por tutmonda afero*. Necesas venki la malfacilaĵojn, kiujn ni alfrontas por ke esperantistoj kaj aliaj fariĝu donacantoj.

Estis ankaŭ propono pri la ebleco funkciigi budon Esperanto-Plus ĉe la malgranda loka bazaro apud Arrout, vendante brokantajn librojn je malaltaj prezoj por la profito de la asocio kaj kolekto de diversaj informoj por krei filmeton kun la plimulto de la amikoj subtenataj, kiuj partoprenos la kongreson en Aruŝo.

Post la kunveno ni disiĝis kun feliĉo vidi, ke ni ankoraŭ sukcesas pluteni la asocion. En tio la efiko de niaj afrikaj amikoj estas netaksebla, ĉar tio donas plenan signifon al nia engaĝiĝo. Dankon al ĉiuj kotizantoj, kiuj sendis rajtigilon pro tio, ke ili mem ne povis ĉeesti kaj ankaŭ al ĉiuj ĉeestantoj, kiuj vojaĝis al la kunveno.

**Évelyne Rotellini**

# Nekrologo

**Pascal Sao (1938-2024)**

Naskiĝinte en la jaro 1938 s-ro Pascal Sao, la patro de Esperanto en Tanzanio, unua ĝenerala sekretario, eksprezidanto kaj honora membro de la landa E-asocio de Tanzanio, forpasis la 16-an de januaro 2024 kaj estis entombigita tri tagojn poste en la vilaĝo Msombwe en la regiono Iringa. Li mortis en la aĝo de 86 jaroj pro alta sangpremo. S-ro Sao laŭprofesie estis ekonomiisto kaj patro de ses gefiloj: Peter, Patrina, Priscar, Patrick, Pendo, Prosper.

**Redaktis: Adjévi Adjé**
**Kunlaboris: Evelyne Rotellini, John Magessa, Mireille Grosjean, Latifou Gbadamassi, Costa Mashauri, Kokou Sagbadjélou, James R. Piton, K. Koffitché**
**Redakcia retpoŝtadreso:**
***revuoafrikaesperantisto@gmail.com***